



Kulturaj Kajeroj

E. MAHE →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Simpla : 3 fkoj

Subtena : 5 fkoj

Bonfara : 10 fkoj

Sendotaj al : Micard Henri

Kulturaj kajeroj

Épineux-le-Seguain (Mayenne)

C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagò 4)

MARTO — APRILO

1960

2

KULTURAJ KAJEROJ

1960

Marto - Aprilo

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

Promesis kunlabori en 1960 :

William Auld (Britujo)
Julio Baghy (Hungarujo)
Delfi Dalmau (Hispanujo)
Alberto Barrocas (Urugvajo)
Hannes Koivu (Finnlando)
Robert Martin (Francujo)
Eugeniuzs Matkowski (Pollando)
William Perrenoud (Svislando)
M. de Waard (Nederlando)
kaj aliaj diverslandaj elstaraj esperantistoj.

ENHAVO

Konversacia Lingvaĵo en nia Literaturo

(W. Auld)

Esperanto tra la mondo.

Turismo :

Bretonio vin vokas (II) (R. Martin).

El ie en la Mondo :

Hispana land-ero en Francujo (P.B.).
Strangaj spertoj de Esperanto-Instruisto
(M. de Waard).

Someraj libertempoj 1960 (M. Bodereau).

Aunis kaj Saintonge : (L. Chasseraud).

Tra la Esperanta Literaturo - Devjatnin V. N.

Fantaziaĵoj : La nevidebla vundo (Mór Jokai —
tradukis : Dro Nagy Istvan).

Por via distro :

Nia Konkurso.

La junaj detektivoj (I).

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

William AULD skribis por vi :

Konversacia Lingvaĵo en nia Literaturo

Unu grava funkcio, ŝajnas al mi, de la Esperantista Kulturdomo estas, doni eblecon por iom daŭraj konversacioj en nia lingvo. El ĉiuj formoj de Esperanto, ĝuste la konversacia lingvaĵo havis relative limigitajn eblecojn por evoluiĝo kaj fluigo, ĉar relative malmultaj esperantistoj daŭre vivas en medio, kie la lingvo estas ĉiutage uzata. Multaj el ni estas izolitaj, la plimulto el ni povas konversacie paroli la lingvon nur de tempo al tempo, kaj ĝenerale nur dum la feria sezono ni dum iom pli longa tempo daŭre kaj sengene paroladas Esperanton. Kompreneble, kiam ajn samideanoj renkontiĝas, ili volonte kaptas la okazon por ekzerci la parolan lingvon, kaj tre rapide eĉ nesperta esperantisto fluigas en tio. Efektive, la pli spertaj esperantistoj parolas la internacian lingvon tiel same facile, kaj perfekte kiel ili parolas sian naciilingvon. Kaj tamen oni de tempo al tempo eksentas, ke ne ĉiuj eblecoj de vigla kaj flua parola Esperanto estas profitataj, aŭ eĉ eltrovitaj, de ĝiaj parolantoj.

Ĉio ĉi estas tute relativa, kompreneble. Esperanto estas jam funde matura lingvo, kaj en la ordinara konversacioj estas veraj malofatoj ĉie en ĉi konscias, aŭ eĉ tute ne konscias, per iuj mankoj. Sed verkisto, kiu volas krei vivecajn kaj kredeblajn fikciajn konversaciojn, baldaŭ renkontas problemojn. Ne malofte la leganto sentas, ke la interparoloj estas tro sentencaj, tro peze klarigaj, malfluaj kaj neverŝajnaj. Mankas spaco por doni ekzemplojn, sed oni trovas ilin abunde en, ekzemple, la romanoj de H.J. Bulthuis.

Kompreneble, krei iluzion de reala konversacio estas problemoj en ĉiuj lingvoj, ĉar laŭvorte transkribindaj konversacioj estas veraj malofatoj ĉie en la mondo. Se vi tion ne kredas, aŭskultu pli atente la konversaciojn en kafejo, en aŭtobuso — eĉ en via hejmo mem! — kaj supozu, ke vi tion legadus! Aŭ prefere registru tion per sonbendo, kaj poste aŭskultu ĝin en solo! Ĉiulingvaj verkistoj nepre devas krei iluzion ĉe la leganto, ke la paroloj estas « el la vivo prenitaj », kvankam tiaj ili vere neniam estas. Tamen la kreado ĉe esperantistaj verkistoj ĝis nun devis esti pli konscia kaj pli krea ol ĉe iliaj nuntempaj naciilingvaj kolegoj. Ili tasko ĝenerale estas prezenti lingvaĵon tian, kia ĝi verŝajne estus, se nur Esperanton ĉiutage parolus milionoj da ĉiuj homoj. Ekzemple :

De supre sur la deklivo venis la voĉo de la arbotrenisto.

— Hot, hot, mia bela ! Ekla ! Jaj, mia brava ! Tiru, do ! Vidu, la vireto bezonas ja lignon !

Barto ridetis al mi. — Dan instigas sian ĉevalon — ti diris.

Subite la voĉo de Dan ŝanĝiĝis.

— Haj, vi straba bovido ! Kion vi faracas, somnambulo ! Atentu do vian ĉevalon ! For, for de la krutaĵo ! Se la arbo misgultos, tiam kun la ĉevalo... Pigra porko vi ! Ĉu tion vi nomas trenejo ? Mi vidis ja korvon traflugi kun pli ol tiom en la ungoj por neston fari ! Vi kota kapo — al pli stulta la Dio ne enblovis ankoraŭ la vivon ! Kristo krevigu vin !

Barto ekridis. — Nun ti krias al sia filo.

(Reto Rossetti : *El la maniko*, p. 89).

Plej sukcesaj tiurilate ŝajnas al mi Reto Rossetti, Cezaro Rossetti, Julio Baghy kaj Ferenc Szilagyi ; sed ne malmultaj aliaj, ekz-e Newel, Forge kaj Schwartz, faris tre brile tiun malfacilan taskon. Kenelm Robinson en « La fremda knabo » interesiĝis pri la kreado de knabejaj konversacioj. El Reto Rossetti mi ĵus citis ; per citaĵoj el liaj tri kolegoj mi eble povas ilustru tri apartajn facetojn de la problemoj : slango, dialekto (aŭ difekta parolo), kaj la uzado de indigenaj esperantaĵoj.

Szilagyi, unu el niaj plej fekundaj kaj maturaj novelistoj, havas apartan talenton krei iluzion de aktualeco de la parola esprimmaniero. Ekzemple, inter ĵurnalistoj :

— *Cu vi scias, kie loĝas tiu tratatulo- bum-bum, tiu Toma, kiu hodiaŭ turmentis la ĉefurbon en la koncertejo...*

— *Mi mem intervjuis lin en Kontinental.*

— *Cu li elsputis ion pri si mem ?*

— *Ne, estis nur rutin-kvakado. Sed ti estas interesa kaj simpata. Ĉion, kion mi skribis pri ti, jam oni povis legi en la anglaj sterkpaperoj.*

(Mistero Minor, p. 57).

En pluraj lokoj Baghy skizas individuecon de malpli grava rolanto per verŝajnecaj lingvaj misformigoj. En lia romano « Sur sanga tero » rolas iu hino, kiu parolas tre karakterize. Oni demandas al li, « *Cu via hundo ?* », kaj li respondas :

— *Ne !... Hundo... hundo boji, kapitano pafi. Hundo ne apateni al Lio Fu Peng. Lio Fu Peng estis ĉe la patlo kaj polti manĝaĵo al li. Kapitano veni, pafi, hundo molli. (p. 9).*

Oni ne volus trouzi tian rimedon, sed ĝia mordera uzo nepre vigligas la rakonton. Fine, jen Cezaro Rossetti. Vidu, kiel li lerte spicas la parolon per proverboj prenitaj el la zamenhofa proverbaro, tiu iom tro neglekta trezoro de pitoreskaj esprimoj :

— *Aranĝite, knaboj ! — diris Benzo — Nu kio ? Iom da tondro kaj hajlo en la policejo, sed tio tuŝis min kiel akvo anseron. Nun ja ili transprenis la zorgon, kaj ĝi donis al ili urtkon en la kalsonon ! Kion fari ? Ili devis eltiri la leonon kun helpo de cirkaj destistoj, kaj ili loĝiĝis ĝin ĉe la cirko. Tamen la besto ja restis mia ! Tion ili ne povis ŝanĝi. Ili akuzis min pri rompo de l' paco ; mi kontraŭakuzis, ke ili senrajte forprenis mian proprajn. Diable, tio matigis ilin ! Ili estis inter marlo kaj amboso — ne sciis kion fari. Mi vidis ilin danceti kiel kato sur fornopato. Fine mi konsentis intertrakti, kaj ili vendis la leonon al la zo' — kreu, mi bone remburis la prezon ! Jes, knaboj, lasu min fari ! mi scias min aranĝi. En mia cerbo ne kreskas herbo. Kiu min tuŝas, min sentas !*

(Kredu min, sinjorino, p. 193).

Tiuj malmultaj ekzemploj celas montri, ke literaturaj konversacioj estas pli realecaj ol realaj. Tamen, ili povas reciproke influu la vivajn konversaciojn. Niaj plej viglaj parolantoj lerte plektas en siajn parolojn belajn frazojn kaj parolturnojn ĉerpitajn el la fikcio, kaj tiel evoluigas kaj maturigas ankaŭ la « ĉiutagan » Esperanton.

Esperanto tra la Mondo



UNESKO KAJ LA CENTA DATREVENO DE ZAMENHOF.

Kiel ĉiujare Unesko rekomendis al la registaroj oficiale celebri la datrevenon de famaj homoj. Inter la ĉijare elektitaj ses eminentuloj ni trovas la nomon de Dro Zamenhof.

ESPERANTAJ MANIFESTACIOJ EN 1980.

Danlando : 17-24 de Julio en Helsingo; diversgradaj kursoj, prepara kurso por Cseh-metodaj instruantoj : L. Fris, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

Nederlando : 7-14 de Aŭgusto, en Krommenie; gastigado de gesamideanoj, allogaj ekskursoj. Informoj ĉe : Sino J. A. v.d. Meulen-v. Harten, Popelstraat 13, Krommenie, Nederlando.

Francujo :

— 15-6 — 20-9 : Studoj, turismo, ripozo en la Kulturdomo de la Franclandaj Esperantistoj.

— Internacia renkonto por tendumantoj en mont-regiono Vercors, 23-29 de Julio. Informoj ĉe : « Bona Stelo », 31, rue Pécherie, Romans (Drôme).

— Internacia ralio de kampadistoj apud St Jean en Royans (Drôme), 29 julio- 7 aŭgusto. Rezervita loko por esperantistoj. Skribi al : Interrilata Centro Internacia de la esperantistaj kampadistoj, 12, avenue Alsace Lorraine, Chartres (Eure-et-Loir).

LA UNIVERSALA KONGRESO EN BRUSELO.

— Du grandaj temoj de la laboraj sekcioj : « Enkonduko de esperanto en la lernejoj » ; « Kontribuo de la movado al la granda projekto de Unesko pri la aprezo de kulturaj valoroj inter Oriento kaj Okcidento. »

— Pluraj kopioj de sonbendo pri la kongreso estas je la dispono de la esperantistaj grupoj.

— Antaŭkongreso en Arnhem (Nederlando). Skribi al : Sro H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem.

— Seminario por Cseh-metodaj instruistoj en Bruselo de la 27-a ĝis la 30-a de Julio. Skribi al : Internacia Esperanto-Instituto Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

— Junula vespero kun la esperantista ĵaz-orkestro de Ljubljana.

— Internacia ekspozicio de fotografajo dum la kongreso.

GELEGANTOJ

Ni ŝatas viajn aprobojn.
Ni multe ŝatas viajn abonojn

ESPERANTO EN...

BRAZILo. — Esperanta poŝtmarko kun portreto de Zamenhof eldonita.

HINDUJO. — « Tiu ĉi lingvo estas granda kaj sankta kreaĵo por la disvastigo de monda frateco » diris la fama socia reformisto Vinoba Bhavé, disĉiplo de Gandhi, kiu lernis esperanton.

— Kvara esperanto-societo en Hindujo ĵus fondita en Allahabad.

ISRAELO. — Post plur-jara stagnado ree vigligas « Esperantista Ligo en Israelo ». Adreso : Jozefo Murjan, Mesilat Je ŝarim 89, Tel Aviv.

CINIO. — Paroladoj kaj ekspozicio de libroj en Pekino; okaze de memorkunveno por Zamenhova datreveno. Multaj ĵurnaloj raportis.

— Nova esperanta ĉina vortaro aperis.

— Baldaŭ aperigo de « Ĉina Antologio » (1949-1959), kun noveloj, skizoj kaj versaĵoj.

NORDA VIETNAMIO. — Prelego de la Ministro de Kulturo antaŭ pli ol 500 gepartoprenantoj, inter kiuj pluraj kulturaj ataŝeoj de ambasadejoj okaze de celebado de la datreveno de Dro Zamenhof.

— La vietnama ambasadoro en Moskvo estas fervora esperantisto.

NORDA KOREO. — Okaze de la Zamenhof-jaro, la financa ministro parolis antaŭ 700 personoj el kiuj pluraj oficialuloj en Pjongjang.

— Ĉiumerkrede dum duonhoru, okazas esperanto-disendo en Radio-Pjongjang.

SVEDUJO. — Junaj esperantistoj, se vi volas travivi la svedajn tradiciajn mezsummerajn, en idilia pejzaĝo (24-26-6), skribu al Borje Andersson, Ingegatan 4 A, Skovde.

JUGOSLAVIO. — Tria Kultura Festivalo de Jugoslavaj esperantistoj en Split (bordo de la Adriatiko) inter la 30-a de Aprilo kaj la 3-a de Majo. Adreso : Esperantisti Festival, Dom Brodogratitelja, Split.

— En la oficiala horarlibro de la jugoslavaj fervoroj la klarigoj estos publikigitaj ankaŭ en Esperanto.

INTERNACIAJ ASOCIOJ

Muzikamantoj. — « La Verda Liro » (membroj en 26 landoj), celas krei internacian servon kaj kontaktojn inter komponistoj, kantistoj muzikpedagogoj kaj muzikamatoroj. Adreso : S-ro Mag. fil. M. Zgorzewski, Wrocław 2, Skrytka pocztowa 22, Pollando.

Tradukistoj. — R.I.D.E.T. (Rondo Internacia de esperantistaj tradukistoj) publikigas en kajeroj la ankoraŭ ne publikigitajn tradukaĵojn de la membroj kaj ankaŭ originalaĵojn. Adreso : Sro J.M.J. Driesen, Sam Mullerstraat 7 A, Rotterdam-West, Nederlando.

Komerco. — C.E.K.I.T. (Centro por esperanto en Komerco, Industrio kaj Tekniko), Piazza Oberdan 1, Milano, Italujo, kolektas por publikigo nomojn de entreprenoj, kie oni kapablas uzi esperanton.

TURISMO

BRETONIO VIN VOKAS ! (2)

Bretonio, kelta lando, estas riĉa de multnombraj dolmenoj kaj menhiroj. Ili estis starigitaj inter la jaroj 2500 kaj 1500 antaŭ Kristo, de ne bone konata raso, tamen sufiĉe civilizita por transporti kaj starigi ŝtonegojn ĝis 350 tunoj pezaj. Tra Bretonio oni povas vidi almenaŭ 20 menhirojn pli altajn ol 7 metroj. La tablo de la vendistoj en Lokmariaker, la menhirilnjoj en Karnak, la menhiro de Kernuz (muzeo de Kemper) estas inter la plej famaj.

Ĉiu kelta grupo, ĉiu tribo, ĉiu klano, havis estrojn, ĉu religiajn ĉu politikajn, spiritaĵojn... Ni retrovas ĥodiaŭ iliajn nomojn ĉe multaj lokoj. Inter la novaj venintoj troviĝis Fragan kaj lia edzino Güen (t.e. Blankulino). La geedzoj jam havis du filojn, Güetenok kaj Jakut. Ili arde deziris trian idon. Tiu deziro estis baldaŭ plenumata ĉar tria filo venis en la mondon. Laŭ legendo, Güen vidanta lin ekdiris bretonlingve : « Güen oll e » t.e. tute blanka estas li. Tiu frazo fariĝis la nomo de la etulo kiun oni nomis Güenole. Dio kreskigis sur la patrinan bruston, trian mamon, kiu ebligis al ŝi laktonutri la trian fileton. Jen kial bretonlingve Güen estas konata sub la moknomo « Güen teirbron » t.e. Trimamulino. Vi povas vidi ŝian statuon en la kapelo de Sta Venek ĉe la vojo de Kemper al Châteaulin.

Ekzistas ja en Bretonujo miloj da lokoj, komunumoj, vilaĝoj, urbetoj, domaroj, kapeloj, fontanoj, eĉ simplaj « diritaj lokoj » kiuj portas sanktulnomojn. Plej ofte, la Eklezio ignoras iliajn nomojn, kiujn ne figuras ĉe la oficiala sanktularo. En multaj lokoj tamen almenaŭ unufoje ĉiujare oni glorigas aŭ solenas iliajn festojn. Estas la tiel famaj « bretonaj pardonoj », tiel pitoreskaj kiel belaj, tre ofte.

Nun ni iomete parolu pri Morbihano, kiu estas unu el la kvin departementoj, kiuj reprezentas la malnovan Bretonprovincin. En la kelta lingvo la

nomo « Mor bihan » signifas « Maro malgranda », kontraste al « Mor Bras », kiu signifas « Maro granda » aŭ Oceano. La urbeto Rochefort-en-Terre havas tute interesan preĝejon, kiu datumas de la XIV-XV-jaj jarcentoj. Estas bela gota konstruaĵo. Interne, belega antaŭkoreja balkono havas kurlozan pordon. Apud tiu-ĉi urbeto sterniĝas la uleksejoj de Lanvaux, kiuj entenas prahistoriajn monumentojn. Vannes estas la ĉefurbo de la departemento Morbihan. Tiu urbo estas sur la rivero Marl. El Vannes ĝis la Atlantika Oceano estas nur 16 km. Vannes entenas du partojn tre diferencajn : la malnova urbo kaj la moderna urbo. La unua, kie troviĝas la katedralo estas konstruita en amfiteatro kaj ĉirkaŭita de fortikaĵo. La stratoj estas mallarĝaj kaj malrektaj. La dua urbo ĉirkaŭas la unuan. Vannes estis la ĉefurbo de Venetoj, kiuj kontraŭstaris J. Cesar, 50 jarojn antaŭ J. Kristo. Sed tiu imperiestro

riskis batalon kontraŭ Venetoj valdivide Lokmariaker, kiu nomigis tiam Dario-uni-on. Estis Romanoj, kiuj faris la vojojn kondukantaj al Korseul, Angers, Hennebont, Lokmariaker, Rennes kaj Nantes.

La katedralo de la urbo Vannes, kiel ĉiuj katolikaj preĝejoj, havas sian ĉefan enirejon okcidente. La stilo de tiu monumento mankas je unueco. Preskaŭ ĉiuj jarcentoj lasis en ĝin sian markstampon. Tiel la malsupraĵo de la ĉefa turo estas el la XIIIa, la ĥorejo el la XVIIa kaj la pordego el la XIXa. Malgraŭ tio la la fasado, kiu estas laŭlonge la « kanonil-koj » strato ne mankas je intereso. Dum la jaro 1530 oni konstruis gracian ĉirklan kapelon el la renesanca stilo kun almetitaj niĉoj kaj kolonoj. La interpaco, kiu estas inter tiu norda fasado kaj la strato estis okupita en la estinta tempo per monaĥejo

kies restas ankoraŭ kelkaj plenarkaĵoj subtenitaj per cilindraj kolonetoj kun kapiletoj ornamitaj per foliaĵoj kaj spiralaĵoj. Fine, monumenta pordo estas rimarkinda ; ĝi konsistas el duobla aperturo kiel korbkurbtenilo kaj kuniga krampo en arkada je la kanonikoj.



R. MARTIN

(daŭrigota)



KALVARIO DE PLEYBEN

AUNIS KAJ SAINTONGE




Aunis kaj Saintonge, du nedisigeblaj provincoj, ne nur ĉar ili kune formas la departementon « Charente-Maritime », kiu estas administra unuaĵo, ne nur ĉar oni ankoraŭ diskutas pri la ĝusta limo inter ili, sed ankaŭ tial, ke fakte estas inter ili multaj kaj gravaj similaĵoj laŭ la historia, geografia kaj socia vidpunktoj.

Historie, estas maleble verki apartan historion de ĉiu provinco : ambaŭ partoprenis la samajn eventojn.

Ankaŭ geografie ili grande similas : ambaŭ havas sian propran marbordon kun ĝiaj insuloj, havenoj, fiŝkaptadoj, strandoj kaj banurboj ; ambaŭ havas sian propran kamparon kun ĝiaj kampoj, herbejoj, vitejoj kaj arbaroj.

Socie, se estas kelkaj diferencoj — ne gravaj — inter la norda parto de la departemento (Aunis) kaj la suda (Saintonge), tamen estis simila dialekto (kiu pli kaj pli malaperas), similaj kutimoj kaj legendoj ; sed la karaktero de la loĝantaro, ĉie pripensema, ordema, laborema kaj iomete malrapidema kaj obstina, varias, en ambaŭ provincoj, inter okcidente kaj oriento : okcidente, ĉe la marbordo, oni trovas la karakteron de ĉiuj maraj homoj en ĉiu parto de Francujo, eble de la tuta mondo ; pli oriente, en la plej granda parto de la du provincoj, montriĝas singardemaj, ŝparemaj "sed "forte pripensemaj kamparanoj, kiuj ne tuj amikiĝas kun la ĵus alveninta fremdulo, sed longe kaj fidele konservas sian amikecon, kiam ili fine akceptis lin.

Kelkaj regionaj eminentuloj. — Tiuj karakteraj ecoj, kaj ankaŭ la duobla aspekto, mara kaj kampara, de la tuta regiono eble klarigas, ke en la du provincoj naskiĝis aŭ vivadis unuflanke famaj vojaĝemuloj kaj esploristoj (Champlain, René Cailté, Pierre Loti), aliflanke kleruloj kaj sciencaj serĉistoj (Palissy, Réaumur), ankaŭ artistoj (Théodore Chassériau, kies patro naskiĝis en La Rochelle, Fromentin, Bouguereau, Noël-Noël).



Saint-Porchaire

La kastelo « La Roche-Courbon »

Sed ni parolu pri la lando mem : la urboj, la insuloj, la marbordo, la kamparo.

La urboj. — La ĉefurbo de la provinco Aunis estas La Rochelle ; tiu de Saintonge estas Saintes.

La urbon **La Rochelle** oni apenaŭ bezonas prezenti al la legantaro : ĝia pentrinda haveno, kun du imponaj turoj ambaŭflanke de ĝia enirejo, estas konata en la tuta mondo per multaj fotoj kaj pentraĵoj ; ankaŭ famaj estas ĝia tria turo (Turo de la lanterno), ĝia Renesanca urbdomo, ĝia impona horloĝturo, la kuriozaj arkajoj de ĝiaj stratoj.

Sed estas multaj aliaj vizitindaj urboj aŭ vilaĝoj en Aunis, kaj ni povas citi nur kelkajn : **Rochefort**, grava milithaveno en la pasinta tempo, bedaŭrinde perdis preskaŭ ĉiujn siajn remparojn, sed enhavas vizitindan domon, tiun de la

fama vojaĝinto kaj verkisto Pierre Loti (1850-1923), kiu kunigis en ĝi multajn memoraĵojn de siaj vojaĝoj tra la mondo. — **Marennes**, centro de la tutmonde konata ostrokulturo, posedas belan gotikan preĝejon. — **Brouage**, rara ekzemplo de fortigita urbo laŭ la konstruaro de Vauban, grava kaj riĉa haveno antaŭ tri jarcentoj, naskiĝloko de Champlain (1567-1655) kiu eltrovis kaj esploris Kanadon, estas nun vilaĝo ĉirkaŭigita de longaj kaj imponaj remparoj, starantaj meze de vastaj kaj marĉaj ebenaĵoj, kiuj antaŭis la maron kaj la estintajn salejojn.

Saintes (antikva « Mediolanum Santonum »), ĉefurbo de Saintonge, nun precipe arta urbo, kun multaj romanaj, romanikaj kaj gotikaj konstruaĵoj, meritas plenan kaj detalan vizitadon: de la romana okupado restas rimarkinda triumfarko, vasta areno, ruinoj de varmbanejo « Saint Saloine » kaj imponaj restaĵoj en ŝtonmuzeo. La « Abbaye aux Dames » (Abatejo por Virinoj) kaj la subtera kriptoj de la preĝejo Saint-Eutrope estas du belegaj ekzempleroj de la romanika konstruaro. La gotikan stilon oni speciale vidos en la cetera parto de Saint-Eutrope kaj en la katedralo Saint-Pierre.

Ĉirkaŭ Saintes preskaŭ ĉiuj urboj, urbetoj, vilaĝoj estas interesaj por la turistoj. Ni citu nur kelkajn: **Saint-Jean-d'Angély** pro ĝia bela horloĝturo kaj diversaj konstruaĵoj, **Pons** pro la alta ĉefturo de ĝia kastelo, **Jonzac**, kiu posedas belan kastelon (nun urbodomo) kaj interesan preĝejon, **Saint-Savinien**, pentrinda urbeto ĉe la bordo de la kvieta rivero Charente, **Taillebourg**, kie la

reĝo Ludoviko la 9-a venkis la Anglojn en 1242, kaj kiu konservis belan turon kaj parton de siaj estintaj remparoj, k.t.p., k.t.p.

Pri **Cognac**, kiu ne estas en Saintonge sed tuj post la limo en la apuda parto de la provinco Angoumois, ni do ne longe parolos, memorigante nur, ke ĝi estas la naskiĝloko de la reĝo Francisko la 1-a, posedas interesan kastelon kaj vizitindajn kelojn plenaj je la fame konata brando « cognac » (konjako).

La insuloj. — Ni revenu al la marbordo, kaj ni vizitu la tri ĉefajn insulojn de la du provincoj. Norde, vidalvide de La Rochelle, **la insulo Ré**, « Blanka Insulo », « Insulo de la Lumo », pentrinda ebenaĵo kun vinberoj kaj salejoj, blankaj domoj malaltaj pro la vento, interesaj preĝejoj, allogaj strandoj kaj havenoj, ĉio sub belega, neforgesebla sunlumo, ŝatata de la pentristoj kaj fotantoj.

Iom pli sude, **la insulo Oleron**, « La verda kaj florplena insulo », iomete similas Ré laŭ la lumo, sed en ĝi kreskas pli da arboj, eĉ etendiĝas arbaroj; ek de Februaro floras la mimozoj; en la vilaĝoj, kies malaltaj domoj estas ĉiujare blankŝmirataj, multaj floroj ornamas fasadojn kaj ĝardenojn. Malpli da salejoj ol en Ré, sed ostrokulturejoj, multaj strandoj, vidindaj preĝejoj, kaj, en Saint-Pierre-d'Oleron, kurioza tipe franca konstruaĵo, la « Lanterne des Morts » (Lanterno de la Mortintoj) kaj la fama « Maison des Aïeules » (Domo de la Avinoj), en kies ĝardeno Pierre Loti dormas sian lastan dormadon.

Multe pli malgranda estas **la insulo Aix**, sed tamen vizitinda, ĉar, pro la fakto ke ĝi estas la lasta loĝejo de la imperiestro Napoleono la 1-a antaŭ lia foriro al Sainte-Hélène, ĝi enhavas, en la « Maison de l'Empereur » (Domo de la Imperiestro) vere interesan muzeon pri la fama regnestro franca.

La marbordo. — Longa je pli ol 200 kilometroj, la kontinua marbordo de niaj du provincoj prezentas longan serion de havenoj, mitulkulturejoj, ostrokulturejoj, kaj ankaŭ de belegaj strandoj kun subtila sablo. Ĝia suda parto ricevis la nomon « Côte de Beauté » (Marbordo de Belec) kaj meritas ĝin. **Royan** estas kvazaŭ la ĉefurbo de tiu suda parto, sed en ĝia ĉirkaŭaĵo etendiĝas pli ol 20 aliaj allogaj banurbejoj: **Talmont, Meschers, Saint-Georges-de-Didonne, Saint-Palais-sur-Mer, Les Mathes, Arvert, Ronce-les-Bains**,... ĉiu havanta unu aŭ plurajn strandojn. — Sed **Royan** meritas kelkajn pliajn liniojn: tute detruita per bombado dum



Brouage. — Kaŝobservejo sur la remparoj

la lasta milito, nun preskaŭ tute rekonstruita laŭ nova plano, ĝi estas la plej moderna banurbode la Atlantika marbordo, eĉ de tuta Francujo; ĉiuj turistoj kaj vizitantoj miregas kaj admiras la aŭdacan stilon de ĝiaj diversaj konstruaĵoj.

Pli norde, aliaj banurboj, inter kiuj Fouras, Châtelailillon estas la du ĉefaj. **Fouras**, kiu ĉiujare pligrandiĝas, kiel la aliaj banurboj de niaj du provincoj, havas tri strandojn. Ĉe unu el ili enŝipiĝis Napoleono 1-a, kiam li devis ŝipveturi al la insulo Aix. En Fouras impona malnova kastelo, kiu fariĝis semaforo, superstaras la ĉefan strandon. En la ĉirkaŭaĵo multaj pinarbaroj proponas sian agrablan ombbron al la promenantoj.



Royan. — Norda ekstremo de la strando kaj fasado fronte al la maro.

(Kliŝo : Syndicat d'Initiative, Royan).

En **Châtelailillon**, tute proksima de La Rochelle, estas malpli da arboj, sed bela longa strando. Apud la urbo vizitu la interesan vilaĝon « des Boucholeurs » (t.e. de la mitulkulturstoj); vi povos vidi, kiel oni kulturas la mitulon.

La kamparo. — Ni nun lasu la marbordon por veturi tra la kamparo. En la ĉirkaŭaĵo de La Rochelle kaj de Rochefort ĝi estas ebena. Sed, se oni veturas orienten al Surgères, se oni vizitas la regionon de Saint-Jean-d'Angély, Saintes, Pons, kaj pli suden, la pejzaĝoj montriĝas multe pli variaj. Vizitu la riĉan valon de la rivero Charente, de Saint-Savinien ĝis Cognac, la valon de la rivero Boutonne apud Saint-Jean-d'Angély, kaj vi facile komprenos la ĝustecon de tiu adjektivo « variaj » : verdaj herbejoj ĉirkaŭitaj de belaj vicoj de poploj ĉe la bordo de la riveroj, boskaj marĉoj (« la verde Venecio »), malaltaj montoj sur kiuj turniĝis centoj da ventmueliloj antaŭ unu jarcento, malgrandaj aŭ vastaj arbaroj (Aulnay, Benon, Chizé), bele kulturitaj kampoj kun tritiko, sekalo, aveno, maizo kaj aliaj diversaj kreskaĵoj, legomoj aŭ fruktoarboj, grandaj kaj pli modestaj vinberejoj, kie oni produktas bonan vinon kaj la faman brandon « cognac » (konjako), ...ĉiuj kamparaj aspektoj estas videblaj en niaj du provincoj Aunis kaj Saintonge.

La artoj. — Ankaŭ ĉiuj aspektoj de la artoj kaj precipe de la konstruado estas troveblaj ĉi

tie, ne nur en la urboj sed ankaŭ en aŭ apud la vilaĝoj. Ni rapide citu, post la **lumenturoj** de la marbordo (Les Baleines, Chassiron, Cordouan, La Coubre, ...), la postsignojn de la **prahistorio** (dolmenoj, ŝtonaj iloj en la muzeoj...), de la **romana** arkitekturo (**romana ŝoseo en Taillebourg**, fundamento de romana urbo en Le Fâ apud Talmont, strangaj turoj en Ebéon kaj apud Saint-Romain-de-Benet, monumentoj de Saintes), la **plej ampleksan aron de romanikaj konstruaĵoj en Francujo** (du « lanternoj de la mortintoj » kaj pli ol 700 preĝejoj en urboj kaj vilaĝoj : la plej imponaj situas en Saintes, en Aulnay-de-Saintonge, en Surgères). Ne tiel multaj sed belaj estas la **gotikaj preĝejoj** (Saintes, Marennes, Moëze, Sablonceaux, Meschers). **Renesanco** postlasis al ni multajn vizitindajn kastelojn, inter kiuj ni povas nomi nur la ĉefajn : Crazannes (parte aliepokaj), La Roche-Courbon (somere : belega spektaklo « sono kaj lumo ») Le Douhet (sama spektaklo Dampierre-sur-Boutonne, Usson, ... **La modernan kaj avangardan konstruadojn** oni trovas precipe en Royan (vendohalo, kongrespalaco, preĝejoj, vilaĝoj...).

Gastronomio. — Nun ni memoru, ke ni estas en Francujo, lando de la bonaj produktajtoj kaj bongustaj kuirajtoj, en Aunis en Saintonge, regiono de la fama butero « beurre des Charentes » (butero de la Charentes). En la insuloj kaj ĉe la marbordo vi povos larĝe gustumi ĉiajn « marfruktojn » : fiŝojn, krustulojn (omarojn en


la insuloj), ostrojn, mitulojn kaj diversajn kon-
kiojn, sed ankaŭ la fiŝsupon kaj, en Fouras la
« chaudière » (fiŝsaŭco), specialaĵo de tiu loko.

En aliaj partoj de la provincoj multe da aliaj
specialaĵoj atendas vin, pri kiuj ni povas nur
iomete paroli en tiel mallonga artikolo. Tamen
ne forgesu la bone preparitajn helikojn kun re-
giona saŭco, la diversajn porkaĵojn : la kolbase-
tojn (kiujn oni manĝas kune kun ostroj, trinkante
bonan blankan vinon « duonsekan »), diversajn

pasteĉojn kaj porkajn spicosauĉaĵojn (« tan-
touillée », « gigourit »)... En Saint-Seurin-
d'Uzet, ĉe la marbordo, oni kaptas sturgojn kaj
preparas la faman kaviaron, kiun vi povos gustu-
mi ĉu en la vilaĝo mem, ĉu en la kuriozaj resto-
racioj de trogloditoj en Meschers.

Tiel estas, resume, niaj du provincoj Aunis
kaj Saintonge. Estimataj legantoj, ili plene meri-
tas vian viziton.

Louis CHASSERIAUD.




EL IE EN LA MONDO

Hispana land-ero en Francujo

Ĉu multaj personoj, eĉ Francoj aŭ Hispanoj, scias pri la « urbo » Llivia? Tiu hispana teritorio troviĝas en Francujo, kaj la Francoj kiuj deziras restadi kelkajn tagojn tie devas sin provizi per tiom da paperoj, kiom necesigas vizito al Barcelono.

Antaŭ tri cent jaroj (1659) estis subskribita de la Hispana kaj Franca ministroj la Packontrakto de la Pireneoj. Per tiu packontrakto la Francoj ricevis du provincojn: unu nordan, Artois, unu sudan, Roussillon. Mazarin, franca ministro, kaj Don Luis de Haro, hispana ministro, lasis al siaj subuloj la zorgon difini la novan orientan landlimon inter Francujo kaj Hispanujo.

Dum tuta monato la francaj kaj hispanaj reprezentantoj multe diskutis sed ne sukcesis inter-



konsenti pri la estonta landlimo. La du ministroj decidis per la tiel nomita « Klarigo de artikolo 42-a de la Packontrakto de la Pireneoj », ke Roussillon kaj Conflent (meza kaj alta valoj de la rivero Tet) apartenos al Francujo kaj Cerdagne al Hispanujo escepte de tridek tri vilaĝoj.

Dudek ok vilaĝojn, kiuj estu francaj, oni facile trovis. La Franca reprezentanto proponis, ke la limo venu inter Puigcerda kaj Llivia, tiu lasta « vilaĝo »

farigante franca. Sed la hispana reprezentanto rifuzis dirante, ke Llivia ne estas « vilaĝo » sed « urbo ». Post nova diskutado estis decidite, ke la limo fakte iros inter Puigcerda kaj Llivia sed, ke tiu lasta « urbo » daŭre estos hispana.

Pro tio ekzistas en Francujo, « ero » de Hispanujo. Nur « ereto » ni povus diri ĉar la tuta teritorio entenas 700 loĝantojn. En Llivia mem (600 loĝantoj) la domoj preskaŭ ne ŝanĝiĝis dum la tri lastaj jarcentoj. Nur antaŭ du jaroj aperis tien elektra kurento kaj kuranta akvo.

Pediranto, kiu deziras vidi « kia estas tiu urbo » povas eniri Llivia-n ĉe Estavar. Se vi posedas la necesajn rajtigilojn vi povas eniri por vizito aŭ eĉ restado ĉe alia punkto. De Hispanujo la enirejo troviĝas ĉe Puigcerda kaj la vojaĝanto trapasos Francujon per 6-kilometrojn longa tre bona vojo neutrala. Kiuj estas la « rĉaĵoj » de tiu teritorio? Iom da bredado, iom da tritiko- kaj terpomokulturado kaj, kompreneble, iom da kontrabando.

Jen alia detalo citinda. Ĉiujare la brutaroj de Llivia migras al la montoj. Sed kompreneble ili estas devigataj trapasi parton de la Franca lando. Jam antaŭ la Packontrakto de la Pireneoj la problemo estis solvita. La migrantaj brutaroj eliras el Llivia ĉe la vilaĝo Angoustrine sed ĉe du diversaj lokoj laŭ la jaro para aŭ nepara. Pro tio la francaj kamparanoj de Angoustrine devas lasi siajn kampojn ne kulturitaj ĉiun duan jaron.

P. B.

Strangaj Spertoj de Esperanto-Instruisto

En la jaroj de la ekonomia krizo 1932-1940 la Esperanto movado riĉe floris en Nederlando. En tiu sama periodo mi profesie laboris en la organizo, kiel esperanto-instruisto, gvidante kursojn, instruante en privataj lecionoj kaj farante prelegojn en la grupoj.

El tiu interesa epoko de mia vivo restis al mi pluraj gajaĵ kaj strangaj spertoj, kiuj kelkfoje jetis akran lumon sur la vanta ofte distruptata tezo, ke « lerni Esperanton estas tiom facile! »

Por multaj el miaj maturaĝaj gelernantoj la gramatiko enhavis aron da apenaŭ frakaseblaj kaj digesteblaj nuksoj, precipe por tiuj homoj, kiuj trapasis nur elementan lernejon... eble antaŭ 30 aŭ 40 jaroj.

Sajnas facila la regulo, ke « ĉiu substantivo finiĝas per -o », sed kion fari, se vi ne scias, kio estas substantivo? Baldaŭ du venis la demandoj, jes ankaŭ la **plendoj**, ĉar montriĝis ke lernanto en franca lingvo senproteste akceptas de sia profesoro la ne-

regulaĵojn de tiu ĉi lingvo, sed li ne pretas digesti la (ŝajnan) neregulaĵojn en la Esperanta gramatiko.

Mi skribas ŝajnan ĉar la neregulaĵoj ja devenas el la gepatra lingvo de la kursanoj. Sekve de ĝiaj malregulaĵoj la esperantaj lernolibroj naciaj devas enhavi grandan aron da reguloj. Ekzemple : multaj lingvoj (inter kiuj mia) ne faras konkordon inter adjektivo kaj substantivo, do en la simpla frazoparo : « la kato estas blanka » kaj « la katoj estas blankaj » la nederlanda ekvivalente por « blanka (j) » estas unu sensanĝa formo. Pro tio naskiĝas la demando : « Kial nun pluralo en via simpla Esperanto ? »

Mia gepatra lingvo igas fari ankaŭ eraron en la uzo de la infinitivo : « ni volas manĝas » aŭ « ni manĝi » ĉar la pluralaj formoj de la konjugacio en la nederlanda lingvo estas egalaj al la infinitivo.

Ĉiuj ĉi eraroj devenis do el la neklera intelektiveco de la lernantoj, por kiuj ankaŭ la akuzativo restis nevenkebla barilo.

Tamen, ankaŭ la scio de unu aŭ pluraj fremdaj lingvoj povis kelkfoje ĝeni. Mi citaŝ : uzo de « tombi » anstataŭ « fali » (laŭ iam lernita franca **tomber**), « alta » por « maljuna laŭ germana **alt**, ankaŭ la renverso okazis, do traduko de la Esperanta vorto « alta » per nederlanda **oud** = maljuna.

Vera terurajo por mi, entuziasma, juna sed nesperta Esperanto-instruisto estis tiuj lernantoj, kiuj eĉ ignoris diferencon inter artikolo (la) kaj pronomo (ĝi), por la neŭtraj substantivoj la sama vorto en mia lingvo. Bonvolu klarigi al tiaj homoj do ĵenajn erarojn : **ĝi** libro estas bela ; **la** estas bela libro !

— o — o — o — o — o —

Iom post iom mi spertiĝis kaj komprenis, ke vortaro estas danĝera instrumento en la manoj de lingva nesciulo : ili serĉas en ĝi necesan vorton ne atentante la gramatikajn indikojn. Tial min atingis iam poŝtkarto, sur kiu gentila lernanto informis min (en Esperanto), ke li ne plu venos al la kurso por certa kaŭzo. Li skribis : « Mi ne venas lagon ». Post cerbumado mi komprenis : li serĉis en vortaro la tradukon por la nederlanda vorto **meer** = plu, sed tiu sama **meer** kiel substantivo estas... lagon ! Do, kvazaŭ en franca lingvo : je ne reviens **la** !

— o — o — o — o — o —

Karakteriza trajto de la nederlanda (ankaŭ de la germana) lingvo estas la disigeblaj verboj, tio estas verboj, kiuj en la konjugacio forŝuŝas prefikson al la fino de la frazo. Komparu en Esperanto « mi foriras » por kio vi povas diri « mi iras for ». Tia verbo estas en mia lingvo ekz. **ataki** = aanvallen. Konjugaciata ĝi disfalas en du partoj. Tiuj du partoj, tradukitaj unuope en Esperanto, liveras « fali » kaj « al ». Jen do la klarigo de la nekompreneble kurioza traduko « la hundo **falis** la infanon al » = la hundo **atakis** la infanon !

— o — o — o — o — o —

Mi sincere esperas, ke per tiu ĉi artikolo mi ne senesperigis estontajn Esperanto-instruistojn. Mi nur volis akcenti, ke oni ne tro insistu pri tiuj facilaj dek ses reguloj de la gramatiko. Mi estas certa, ke ĉiu instruisto havas similan sperton, kaŭzitajn de malregulaĵoj en la gepatra lingvo aŭ sekvantajn el neklereco de la lernanto.

Estus interese interŝanĝi spertojn tiurilatajn en tiu ĉi revuo.

M. DE WAARD.

Esperantista Kulturdomo

Grésillon proponas dum somero 1960, kiel dum la antaŭaj jaroj, varian programon por restadoj. En agrabla kadro, lertaj esperantistoj kaj komencaj... aŭ komencaj, trovos ripozon, distrojn kaj kulturajn okupadojn.

Vi povis vidi alie detalan programon por somero 1960. Ĝi montras la vignecon de la Kulturdomo. Malgraŭ tiu programo, vi trovos en Grésillon la deziritan ripozon. Fakte, ĉiu estas libera sekvi aŭ ne la kursojn aŭ paroladojn. Vespere, la distroj estas diversaj : ludoj, lumbildoj, kinoj, dancoj, amikaj paroladetoj, k.t.p.

Ĉu vi atente legis la planon de la restadoj ? Por la komencantoj kaj komencaj, diversaj kursoj estas planitaj :

- de la 15a ĝis 30a de junio ;
- la 1a ĝis 14a de julio ;
- 7 ĝis 28a de aŭgusto ;
- 28 de aŭgusto ĝis 11a de septembro.

La superaj kursoj okazos :


- de la 1a ĝis la 14a de julio ;
- de la 7a ĝis la 28a de aŭgusto ;
- de 28 de aŭgusto ĝis la 11a de septembro.

Libertempoj internaciaj kaj kulturaj oferas al la lertaj esperantistoj riĉenhavan kaj interesan

Someraj

libertempoj

★ 1960



programon sub la gvidado de altvaloraj esperantistoj kies nomojn vi trovos alie. « Kurso de franca lingvo al la alianduloj pere de esperanto » estas planita speciale por la nefrancilingvanoj, sed ĝi devas interesi ankaŭ la francojn. La partopreno de la francoj estas nepre necesa por helpi la aliandulojn kaj plivigligi la kursojn. Tiu duobla ĉeestado profitos al ĉiuj.

Krome, Grésillon oferas al vi multajn ekskursojn en la ĉirkaŭaĵoj. La kasteloj de la valo Loire estas tute proksimaj. La urboj Angers, Tours, Le Mans ankaŭ, kaj ili indas esti vizitataj, same kiel Nantes kaj la tute proksima marbordo.

Vi povos ankaŭ, de la 7a ĝis la 28a de aŭgusto, studi la mataron. La amatoroj trovos ankaŭ specialan lokon kun la necesa ilaro por praktiki la bindarton.

Ne hezitu veni al Grésillon, kiu, jaro post jaro, igas ĉiam lomete plikomforti. Vi trovos la idealan lokon por ripozi... La banejo esta je via dispono, same kiel la lageto kie vi povos fiskaŝpi.

Fine, estu certa ke restado en Grésillon permesos al vi kreskigi la nombron de viaj amikoj, ĉu tio, sole, ne valoras la vojaĝon ?

Skribu do, de nun por peti la deziritajn klarigojn.

Tra la Esperanta Literaturo

UNUAJ PAŜOJ

DEVJATNIN Vasilij, Nikolajevič (1862-1938)

« Mi estas nova esperantisto... » balbutis mi,
« Mia nomo estas Devjatinin. » — « Ha, » kriis Zamenhof, « mia korespondanto kaj kunlaboranto, tradukinto de « Demono ». Estas tre agrable konatiĝi kun vi persone ! »

« Ha ! Devjatinin ! La fama poeto ! Kara samideano, senkulpigu min, « diris Carlo Bourlet » ke mi ne tuj rekonis vian nomon... Sinjoro, via « Demono » estas la unua poezia verko, kiu igis min senti, ke esperanto estas io alia ol simpla, sengusta, facila komunikilo ! »

Tiu prezentado de Devjatinin per si mem kaj per Carlo Bourlet, redaktoro de « La Revuo » montras, ke jam dum la unuaj jaroj de esperanto, li estis bone konata, kiel tradukinto de poeziaĵoj. Sed li ne nur tradukis sed ankaŭ verkis originalaĵojn. Kiu li estis ?

« Ruso, li naskiĝis en 1862 kaj pasigis siajn infanajn jarojn en la sovaĝa Orlova Regiono. Li fariĝis instruisto de la latina kaj rusa literaturo en Kiev, poste en Vilno » (Enciklopedio, p. 108).

Kiam en 1892, li trovis la unuan lernolibron de Esperanto, li jam konis Volapukon, sed ĝin opiniis ne taŭga. Post kelkaj tagoj li povis skribi al Zamenhof, en la nova internacia lingvo. Baldaŭ komenciĝis tre viva korespondado inter la du viroj.

Sed Devjatinin estis transmetita al ia sovaĝa vilaĝo « kie preskaŭ tute forestis eĉ ia similaĵo je civilizita homaro ». Tie li devis pli multe pensi pri siaj devoj familiaj kaj servaj ol pri esperanto, kiun li tute forgesis. El tiu domo lin vekis Dro Nauman, lia esperantista amiko de Vilno. Kaj ree Devjatinin laboradis. Komence li eldonis la unuan libron de sia plena verkaro. En 1905 li partoprenis la Unuan Universalan Kongreson kaj fariĝis Lingva Komitatanano. En 1911 li gajnis premion en la Literatura Konkurso. Li laboris por Esperanto en Parizo. Munkeno kaj Leipzig. En Julio 1914, survoje al Parizo por la U.K. li estis arestata kaj fariĝis militkaptito apud Liepzig ĝis 1918. Li donis esperantajn lecionojn en la militkaptejo mem kaj post la milito vivis en Leningrado kaj fine en Kiev kie li mortis.

En la enkonduko de Esperanta Antologio, W. Auld prezentas al ni Devjatinin la verkiston, jene : « La plej gravaj poetoj de la Unua Periodo, kiuj vere laboregis kun matura kapablo kaj celkonscia talento por krei taŭgan poezian instrumenton, estis unuavice tradukantoj. Ili estis Antoni Grabowski kaj... Devjatinin V.N., kolosa sed hodiaŭ neglektata talento, kiu aperigis kvar volumojn el sia « Plena Verkaro » en 1906 (2 volumoj — 1908 kaj 1911) Ilia kontribuo al la esperanta parnaso estis unuaranga ».

Konata, ĉe la komenco, pro sia traduko de la

poemo « Demono » de Lermontov, Devjatinin tradukis ne nur plurajn poemojn sed ankaŭ prozaĵojn de Puŝkin : « Boris Gudunov », « Poltava », « Ruslano kaj Ludmilo ». Li ankaŭ verkis la unuan gravan esperantlingvan originalon : « Nevola Mortiginto » kaj plurajn aliajn originalojn.

Ni nun prezentas unu el la originalaj poemoj de Devjatinin. Eble tiu « Malliberulo » ne estas la plej konata sed ĝi ŝajnas al ni bona ekzemplo de la talento de Devjatinin. Ĝin legante ni ne devas forgesi ke tiun poemon la aŭtoro skribis ĉe la unuaj jaroj de la esperantista literaturo.

Malliberulo

Ne besto sovaĝa, fermita en kaĝo,
De ĉeno fortika sin ŝiras,
Ne gaja birdeto, kaptita per reto,
Pri freŝa aero sopiras —
De ĉeno sin ŝiras, senfine sopiras
Junulo tre bela, tre brava... !
Predikis li veron, justecon, liberon
Kaj pensis, ke estas li prava...

Revanto ne vidis, ke ĉiuj ni ridis
Je lia parolo sovaĝa :
Sin amo inspiris, sed ĉiuj rediris
Ke estas li homo malsaĝa !

Li multe suferis, li multe esperis,
Li kredis, ke venos libero —
Kaj ree kun amo predikis pri amo,
Pri paco tutmonda ; pri vero...

Ho ! Kia eraro ! Neniam homaro
Resonos al voko predika :
Homaro — prudenta, kaj estas sensenta
Al voko malforta, amika !

Sed li ne silentis ; li pensis, li sentis,
Ke homoj lin fine komprenos,
Ke liaj amikoj al liaj predikoj
De ĉie kun ĝojo alvenos...

Kaj jen rezultato : li en kazemato
En ŝarĝaj katenoj nun sidas,
De ĉeno sin ŝiras, senfine sopiras, kaj vane
liberon avidas.

DEVJATNIN.

Germana UEA- delegito, 32-jara, fraŭla, sen specialaj kapabloj, serĉas manlaboron en fabrike ktp. Li povus akcepti krome germanlingvan komercan korespondadon al similan. Loko proksima de Parizo dezirata sed ne deviga. Skribu senprokraste al la perantino : Mlle J. Jannin, 66, rue Paul-Langevin, Aulnay-sous-Bois (S.-et-O.) (en Esperanto **ao franc-lingve**).

FANTAZIAJOJ

La nevidebla vundo

(Resumo de la novelo de la fama hungara verkisto
Mór Jokai, 1825-1904)

Frumatene bone vestita viro frapetis sur la pordo de la fama ĉefurba kuracisto. Li venis de provinco. La kuracisto tuj vidis, ke li tre suferas. La viro montris sian maldekstran manon, etan punkton sur la mandorso kaj petis la kuraciston tuj operaci ĝin. Ĉar la kuracisto nenion vidis tie, sur la mandorso, li pensis, ke la malsanulo estas eble freneza. Sed la paciento persistis, ke li ne povas elteni la suferojn, kaj denove petegis la mediciniston tuj fari la operacion. La viro, per krajono, markis la lokon, kiun li devas eltranĉi. Samtempe li metis grandan monsumon sur la tablon por prui, ke li persistas en sia decido. Se la doktoro ne volas kredi al li, li deklaris, ke li mem eltranĉos la brulantan parton de sia mandorso kaj la kuracisto bonvolu bandagi ĝin post la eltranĉado.

Fine la kuracisto faris la operacion, kiun la fremdulo tute trankvile rigardis, eltranĉante la markitan parton de la mano. Tuj post la operacio la viro ne sentis plu la doloron, iĝis gaja; lia vizaĝo sereniĝis kaj kun granda danko li adiaŭis al la doktoro kaj reiris en sian provincan hejmon.

Post tri semajnoj la stranga viro denove aperis ĉe la doktoro. Liaj trajtoj estis deformitaj pro la granda doloro. Li diris nenion nur montris sian maldekstran manon. La kuracisto vidis nur la cikatron sur la mandorso. La malsanulo plorante petegis la kuraciston ke li pli profunde eltranĉu nun tian parton de la mandorso.

Post la dua operacio la paciento denove ŝanĝiĝis; malaperis la morta paleco de lia vizaĝo, sed nun li triste dankis la kuraciston pro lia helpo kaj diris, ke post unu monato certege li devos lin reviziti.

Sed post unu monato ne la viro, sed longa letero alvenis, subskribita de la konata provinca viro. Li priskribis la estigon de la nevidebla vundo. Jen mallonge la letero:

« Mi feliĉe vivadis depost unu jaro kun mia belega, juna edzino, kiu estis malriĉa konversaciantino ĉe la najbara grafino. Ŝi tre amis min, sen mi, ŝi ne povis esti unu tagon. Subite, meze de nia plej granda feliĉo, mi komencis dubi pri ŝia sincereco: ĉu ŝia sintenado ne estas nur simulado? Mia edzino havis kudrotablon, kies fakon ŝi ĉiam zorgeme ŝlosis. Unufoje mi sendis sin al la grafino kaj post ŝia foriro mi tuj malfermis la fakon, kie mi trovis leterojn: ili estis amleteroj! Mi legis ĉiujn. Mia plej bona amiko skribis ilin. La leteroj estis plenaj je pasio kaj amo; li donis konsilojn al mia edzino, kiel trompi la edzon kaj la datoj de la leteroj estis post mia geedziĝo. Fininte la legadon, mi ĉion remetis en ordo, kie ili estis.

« Vespere ŝi alvenis hejmen. Mia edzino tuj kuregis al mi kaj pasie kisigis min. Ankaŭ mi estis tre aĉabla. Post la vespermanĝo mi iris en niajn dormotamborojn. Meznokte mi iris en sian dormotamboron. Ŝi estis belega en la liton. Mi ĉirkaŭprenis

sian kolon kaj sufokis ŝin. Mi venĝis sian malfidelecon. Kaj tiam mia edzino malfermis siajn grandajn, belajn, blujajn okulojn, mire min rigardis unu minuto kaj mortis. Nur unu malgranda sangogluto elvenis el ŝia buŝo, kiu falis — vi tre bone scias, Sinjoro Doktoro, kien. Matene mi rimarkis ĝin sur mia mandorso, sed tiam ĝi jam sekigis.

Post la enterigo alvenis la najbara grafino kaj diris ke ŝi deziras paroli kun mi pri la sekreto. Ŝi transdonis faskon da leteroj al mia edzino por gardi ilin por ŝi kaj nun ŝi volas ricevi tiujn. Mi malfermis la kudrotablon kaj mi transdonis tiujn leterojn al la grafino, kiujn mi, antaŭ kelkaj tagoj, legis. Ili estis skribitaj al ŝi de ŝia amanto.

Post la foriro de la grafino mi kuregis en la kripton de mia edzino. Mi petegis ŝin, ke ŝi punu min, svenis aŭ songis — mi ne scias kiom da tempo mi tie pasigis — sed mi sentis, ke la mortintino levigas. Ŝia lipo estis pala, sed sur ĝi estis sangogluto. Malrapide ĝi klinis sin, malfermis siajn okulojn kaj kisigis mian manon. La sangogluto denove restis de ŝia lipo sur mia mandorso. Poste la krovrolo de la ĉerko fermiĝis. Kaj la loko de la sangogluto komencis dolori. Vi vidis miajn suferojn. »

Post kelkaj tagoj la gazetoj skribis, ke riĉa provinca bienposedanto mortpafis sin. Laŭ onidiro, pro la morto de sia edzino, aliaj diris pro ia nevidebla vundo.

El la hungara lingvo tradukis:
Dro Nagy Istvan.

NI RECEVIS

Korespond-Amikoj por Paco per Esperanto. — Adresaro de la Societo de Internaciaj Korespondamiko, 1432, Kamišidami Moriŝimaŝi, Aĉiken, Japanujo. Bela libreto ilustrita per la fotoj de la korespond-petantoj.

Polaj Okcidentaj kaj Nordaj Teritorioj — libreto pri historio kaj ekonomio de tiuj polaj regionoj eldonita de Zachodnia Agencja Prasow, Poznan.

De Parizo al Lazura Marbodo — 32-paĝa libro kun ilustraĵoj kaj multaj informoj pri la vojo de Parizo al Nice kaj pri la laŭvoja vizitindaĵoj. Havebla (180 NF. aŭ 4 rpk) ĉe la aŭtoro: Sro Retot, 162, Boul. A.-Briand, Montreuil (Seine).

Ora Ulekso — tre interesa multobligita informo kaj kultura bulteno de Okcident-franciaj esperantistoj. Adreso: M. Ome, 5, rue Rabelais, Rennes.

Esperanto, Ariadna fadeno de l'koro kaj de l'spirito dulingva (franca kaj esperanta) libro verkita de P. Delaire, kun antaŭparolo de Maurice Lavarenne, Profesoro ĉe la Beletra Fakultato de Clermont-Ferrand. — Ampleksa libro entenanta multajn diversajn ĉapitrojn. Ĝi entenas ĉion, kion oni povas diri pri Esperanto. Taŭga legolibro kaj propagandilo.

Tatroj Zakpane. — Ilustrita faldfolio pri la Tatraj montoj, eldonita de Komitato por Turismo, ul. Litewska 2/8, Varsovio.

Kie Abundo estas malofta kaj manko pli malofta : Dario 32-paĝa libreto pri Danlando eldonita de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj — bonega enkondukilo en danajn aferojn, speciale redaktita por eksterlandanoj — Havebla ĉe la plej proksima Dana Ambasadejo.

POR VIA DISTRO



Nia konkurso

4-a parto

Ni petas ĉiujn konkursantojn respondi la tri ĉisubajn problemojn, sed la tria estos uzota nur por dispartigi tiujn, kiuj estos ricevintaj egalan nombron da poentoj. Ni ankaŭ petas ĉiujn sendi siajn respondojn, kiel eble plej frue, ĉar ni devas aperigi la rezulton en la venontaj « Kajeroj », kiuj aperos komence de Junio.

— 0 — 0 — 0 — 0 —

1-a PROBLEMO

Anstataŭigu la punktojn per la taŭgaj vortoj (2 poentoj por ĉiu vorto ĝuste trovita) :

« Kamparineto ... prezentis ... la servpordo de reĝa palaco por liveri, ... kutime, korbon ... ovojn. Si vidis eliri fortikan viron ĉase vestitan ;

— Estas ... servisto pensis ... ; kaj ŝi liveris al ... la ovojn.

Tiu prenis la korbon kaj elpagis ŝin.

— Aŭskultu, diris la junulineto al li. Mi donos al ci du soldojn, se ci vidigos al mi la reĝon !

— Jen la reĝo mi estas, ekkriis ridante la viro.

Ekridegante la ineto respondis al li :

— ... ĉi ? He, foriru ! Mi konas la reĝinon ; ŝi estas tiel bela, ke ŝi ne estus edziniĝinta ... viro tiel malbela.

Viktoro Emanuelo 2-a interŝange de tiu komplimento, donis al la etulino ... moneron, sur kiu estis gravurita lia portreto.


— 0 — 0 — 0 — 0 —

2-a PROBLEMO

Kruevortoj (20 poentoj)

Horizontale. — 1) Nomo de tago ; nomo de monato. — 3) Nukseto ; konstrumaterialo. — 5) Altvalora metalo ; akvego ; ne nur. — 7) Gravega korpoparto ; parto de tuto ; alta konstruaĵo. — 9) Parto de la semajno ; arbo ; naskaĵo. — 11) Nekomprenebla afero ; ŝipeto. — 13) Okbraka marbesto ; malpraktiko.

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13



Vertikale. — 2) Akvujo por fiŝoj ; patrino de patrino. — 4) Granda rabobirdo ; teksaĵo el lino ; sankta nombro. — 6) Sufa haro ; fajrujo. — 8) Diligentega insekto ; rusa virinomo. — 10) Denove ; doma besto ; lavilo. — 12) Mezurunuo de fluaĵoj ; fari gazeton.

— 0 — 0 — 0 — 0 —

3-a PROBLEMO

Plia demando (nur por dispartigi la ekvalgajnintojn).

— Kiom da personoj partoprenis la konkurson ?

(Ni atentigas vin, ke nur la abonintoj al « Kulturaj Kajeroj » rajtis partopreni ĝin, kaj, ke ili estas proksimume 700). Felice por la konkursantoj, ne ĉiuj partoprenis la konkurson !)

Sendu viajn respondojn, kiel eble plej frue al : S-ro Pierre Chevalier, 19, Boulevard Gabriel-Lauriol, NANTES (L.-A.), Francujo.

Le Gérant : H. MICARD

IMP. COCONNIER, BALS

LA JUNAJ

DETEKTIVOJ

ILUSTRITA RESUMO DE LA NOVELO DE J.H. SULLIVAN

(1-a parto)



La farmdomo de Sro Konrado Parano staris inter la vilaĝo Montoverda kaj rivero. Tie loĝis Andreo kaj Lizbeto Trentano, du ĝemeloj, kies patrino mortis kaj kies patro multe vojaĝis pro sia laboro.




Andreo ofte pensis pri kontrabandistoj, ĉar la apuda rivero konsistigis la landlimon de Karenlando. Sed li pensis, ke tiaj aferoj ne plu okazas, ĉar multaj estis la gardistoj.

Lia fratino ofte mokis lin: « Hej, maldiligentulo! Ni iru al la rivero. Eble vi vidos unu el viaj amataj kontrabandistoj! » « Ne estas eble transiri la riveron sen kapto », diris Andreo.



« Sed rigardu Andreo, se ne ekzistus kontrabandistoj ĉu vi opinias, ke la gardistoj marŝus laŭ la riverbordo, ankau nokte? »

Post la promonado.
« Rigardu Andreo! Jen tiu aŭtomobilo denove ». — Ĝi apartenas al amiko de Onklo Konrado », respondis Andreo. « Tio estas tamen stranga afero! »



« Vi revas pri la kapto de kontrabandistoj, Andreo, sed vi ŝteliam kaptus muŝon. Ĉu vi vidis la grandan pakadon? Je ĉiu vizito, la viro forportas simalan pakadon el la kelo ».



(Represita kun permeso de la aŭtoro kaj de la eldonistoj de « La Junaj Detektivoj ». La libro (43-a paĝa novelo kun 9 ilustraĵoj de Brenda Goodwin) estas aĉetebla ĉe Esperantaj Libroservoj, aŭ rekte ĉe la eldonistoj, The Esperanto Publishing Company Ltd., 100 Long Lane, Rickmansworth, Herts. Anglujo, po 4 int. respondukponoj.)

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (20 aŭst. ŝil.).

Belgujo : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364, BRUXELLES 18.

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (6 ŝil.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (2,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33 (3 mark.).

Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, 19a) HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (13 mark.).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (40 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (450 liroj).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (6 kr.).


Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K (6 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (30 Zlotoj).

Svedujo : S-ro Rune Palmgren, Persikogatan 32 III, Stockholm-VALLINGBY (4 kron.).

Svislando : S-ro Pierre Metivier, Via Ferrera, Ascona (Tes.) (3 sv. Frank.).

Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (11 st.), aŭ respondkuponoj (8 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncintajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo